

N. N. 11,  
Vaga kanto

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

1. L'antaŭtagmezon tutan mi  
Studadis kun fervor',  
Nun posttagmezon ĝojos en  
Bierejo mia kor'!  
Pli frue mi ne lasos ĝin,  
Ol vokis la meznokto min.  
Viválllerallál-lerálllerallá,  
Viválllerallálllerallá!

2. De l'viv' plej granda ĝojo jen  
Do estas am' kaj vin',  
De l'amatino ĉirkaŭpren'  
Sentigas princo min!  
Kaj ĉe hordea suko eĉ  
Mi revas laŭ kronita reĝ'!  
Viválllerallál-lerálllerallá,  
Viválllerallálllerallá!

3. Ja homo sen de am' inklin'  
Nek vinon amantul'  
Neniam amikigos min  
Nek estos ajn karul'.  
Similas vivo tia nur  
Malbonan kampon sen kultur'!  
Viválllerallál-lerálllerallá,  
Viválllerallálllerallá!

4. Jam ofte pensis mi, pro ĉiel'!  
Ke de l'Kreinto do  
Pri soifo estas la kamel'  
Tre favorata, ho!  
Barelon kiel ventro ĝi  
Enhavas per naturmagi'!  
Viválllerallál-lerálllerallá,  
Viválllerallálllerallá!

...

N. N. 11,  
Studenta kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1. La tutan tagon studis mi  
Senpaŭze ĝis vesper'.  
Nun dediĉita estu ĝi  
Finfine al bier'.  
Nur volas iri hejmen mi,  
se sonas de l' gardisto kri'.  
Viválllerallál-lerálllerallá,  
Viválllerallálllerallá!

2. Plej bela aĵ' en mondo ĉi  
Ja estas am' kaj vin',  
Brakumas mian inon mi  
Kaj sentas princo min.  
Mi revas, ke kun reĝa kron'  
Mi sidas alte sur la tron'.  
Viválllerallál-lerálllerallá,  
Viválllerallálllerallá!

3. Se hom' ne sentas ĉarmon de  
La bel' kaj de la vin',  
Na ŝatas tiun mi kaj ne  
Salutas kore lin.  
Egala ŝajnas tiu ĉi  
Al malfekunda kamp' al mi.  
Viválllerallál-lerálllerallá,  
Viválllerallálllerallá!

4. Jam ofte mi - ĉe la ĉiel' -  
Pensadis pri l' kamel':  
Komforton havas tiu ĉi;  
Ĉar portos ĝi en si  
Barelon, se ne akvo en  
Ĉi tiu estus jen.  
Viválllerallál-lerálllerallá,  
Viválllerallálllerallá!

...

5. Ĉu - kien mia - scias vi -  
 Kompreno iris for?  
 Ebrie sentas preskaŭ mi,  
 Batadas mia kor'.  
 Okulo surda, muta naz',  
 Senvida lango - stranga kaz'!  
 Viválllerallál-lerálllerallá,  
 Viválllerallálllerallá!

5. Ho, karaj fratoj, estas ne  
 Plu klara pens' en mi;  
 Mi havas la impreson, ke  
 forlasis min raci'.  
 Tordiĝas miaj sensoj kvin  
 Kaj tio konfuzigas min.  
 Viválllerallál-lerálllerallá,  
 Viválllerallálllerallá!

6. Ho, mastro, unu glason nur,  
 Enverŝu sen envi'!  
 La ŝuldon skribu al la mur',  
 Jen mia garanti':  
 Por la pruntita biero ĉi  
 Prezentas mian ĉapon mi!  
 Viválllerallál-lerálllerallá,  
 Viválllerallálllerallá!

6. Plenigu por mi drinkemul'  
 La glason ree vi!  
 Ĝin notu, mastro, sur tabul',  
 Pruntita estu ĝi.  
 Mi lasas mian ĉapon kun  
 promes' de posta pago nun.<sup>2</sup>  
 Viválllerallál-lerálllerallá,  
 Viválllerallálllerallá!

*Traduko de la Germana poemo "Studentenlied" de N. N. 11 en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 - †1919) en 1907.*

*Traduko de la Germana poemo "Studentenlied" de N. N. 11 en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2007-03-20.*

Arg-389-766 (2007-03-18 11:59:11)

Arg-389-767 (2007-03-23 11:43:37)

*La originan germana-lingvan tekston de tiu ĉi kanto mi, Manfred Retzlaff, elprenis el la retejo de sinjoro Frank Petersohn <http://ingeb.org/Lieder/ichhabde.html>. Tie estas indikite, ke la dua kaj la tria strofoj estas antaŭ la jaro 1794 verkitaj de Joachim Perinet (1765-1816). Vidu ankaŭ: <http://www.markomannia.org/index.php?target=liederbuchlied&liedid=284>. La esperantigon mi trovis en la kant-libreto "Esperantista kantaro", kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, verkisto. La kantlibro estas eldonita en 1907 de la eldonejo Hans Theodor Hoffman, Berlin W 35, Steglitzer Straße 44. (Sur la paĝoj 9 kaj 10 de tiu kant-libreto estas intershanĝitaj la strofoj 3 kaj 4, kompare al la origina germana teksto. Mi re-intersanĝis tiujn.) La melodio de la kanto estas indikita en ambaŭ retejoj en formo de midi-dosiero.*

*La originan germana-lingvan tekston de tiu ĉi kanto mi, Manfred Retzlaff, elprenis el la retejo de sinjoro Frank Petersohn <http://ingeb.org/Lieder/ichhabde.html>. Tie estas indikite, ke la dua kaj la tria strofoj estas antaŭ la jaro 1794 verkitaj de Joachim Perinet (1765-1816). Vidu ankaŭ: <http://www.markomannia.org/index.php?target=liederbuchlied&liedid=284>. La melodio de la kanto estas indikita en ambaŭ retejoj en formo de midi-dosiero.*

<sup>2</sup>aŭ:

Kaj prenu mian ĉapon ĉi,  
 Ĝi estu via garanti'